

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KROATA ESPERANTISTA UNIŬO

DUMONATA

GAZETO



Prezo de ĉi tiu

numero

150 HRD aŭ 2 guldenoj

Redakcio:


Trg burze 2

ZAGREB

Jarabono

600 HRD aŭ

12 guldenoj



Matija Gazdek
b.l. "D. Domjanić"

PRIPENSU!

" KROATA ESPERANTISTO "

izdavaĉ i osnivaĉ

eldonisto kaj fondinto

HRVATSKI ESPERANTSKI SAVEZ

KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO

ZAGREB, TRG BURZE 2

urednik / redaktoro

Marija Belošević

jeziĉno preĝledala

lingve kontrolis:

Lucija Borĉić

izlazi dvomjeseĉno

aperas ĉiun duan monaton

Za sadrĵaj ĉlanaka odgovaraju sami autori.

Pri ĉiuj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Tisak / Presejo

"More", Preradoviĉeva 7/1, Zagreb

tiskano/presita: 1992.9.28.

cijena ovog broja / prezo de ĉi tiu numero

150 HRD aŭ 2 guldenoj (eksterlando)

godiŝnja pretplata / jarabono

600 HRD aŭ 12 guldenoj (eksterlando)

Eksterlandanoj pagu al UEA konto KREU-g

Ĉlanovi Malog Vijeća HES / Estraro de KEU

- Radenko Milošević, predsjednik/ prezidento

- Marija Belošević, tajnik/sekretario

- Ivan Bekavac - Basić, potpredsjednik / vicedprezidanto

- Sandra Gabrilo, potpredsjednik/vicedprezidanto

- Zdenka Svetličić, potpredsjednik/vicedprezidanto

- Franjo Šlabek, potpredsjednik/vicedprezidanto

Miŝljenjem Ministarstva prosvjete, kulture i ŝporta Republike Hrvatske br. 523-03-1/7-92-01, klasa 612-10/92-01-740 od 07. rujna 1992. godine, novine Hrvatskog esperantskog saveza "Kroata Esperantisto" oslobodene su poreza na promet proizvoda.

Tuj ĉe la komenco de ĉi numero ni dankas al ĉiuj kiuj dividas feliĉon kun ni rehavi " Kroata Esperantisto "-n. Ni ricevis plurajn gratulojn jam en Vieno, fakte semajnon post la apero. Pluraj eĉ esprimis deziron aboni al ĝi, kaj kelkaj jam faris tion. Dankon!

Ĉi foje ni ne prezentos apartajn opiniojn, sed de la venonta numero estos rezervita spaco por viaj reagoj. Al la redakcio estis direktitaj same kritikoj. Ili same bonvenas, ĉar de la eraroj oni lernas, kaj ĉiu kritiko plibonigos la gazeton.

Do, ja, ni pardonpetas al ĉiuj pro la diverspecaj eraroj en la unua numero. Ja ĉiu komenco, kaj same rekomenco estas malfacila.

Ni denove alvokas ĉiujn kiuj eble ricevis iun numeron de la iama " Kroata Esperantisto " aŭ simple ie ajn trovis ian mencion pri ĝi. Nepre kontaktu nin, ĉar ni tre volonte aperigos tion.

Ni deziras ĉiam esti aktualaj kaj prezenti al vi aktualaĵojn okazintajn ĝuste inter la du numeroj. Se en tiu periodo ni havos eblecon eĉ intervui iun pri la aktuala temo ni prezentos tion al vi. Do, jen en la numero vi trovos intervjuon kun la vicministro de la BkH registaro. Ni esperas, ke vi kontentas pri tio.

En la tekstoj vi trovos amason da mallongigoj, kelkaj eĉ ripetigas en plurajn tekstojn. Ni ne klarigos en la teksto la mallongigon, sed vi trovos ĉiujn klarigojn ie en la gazeto (laŭ la spaco). Por ke vi ne vagadu vi ĉiam trovos indikon en la enhavo.

Laŭ la alvoko el la unua numero, estas videble ke ĉiuj tekstoj ne estas de unu verkinto. Same validas por aliaj numeroj, ĉar ja, " Kroata Esperantisto " estas oficiala organo de Kroata Esperantista Unuiĝo, sed same malfermita al la mondo. Eluzu la eblecon!

Do, kune al la pli bona estonteco kun unu nova gazeto!

Marija Belošević

MALLONGIGOJ:

AKK	- Asista Kongresa Komitato
ES	- Esperanto Societo
IE	- Internaciaj Ekzamenoj
IEI	- Internacia Esperanto - Instituto
IJF	- Internacia Junulara Festivalo
IJK	- Internacia Junulara Kongreso
IJS	- Internacia Junulara Semajno
ILEI	- Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IS	- Internacia Seminario
JEL	- Jugoslavia Esperanto - Ligo
KEU	- Kroata Esperantista Unuiĝo
KKS	- Konstanta Kongresa Sekretario
UEA	- Universala Esperanto - Asocio
UK	- Universala Kongreso
UN	- Unuiĝintaj Nacioj

ENHAVO

● MALLONGIGOJ- U grata paglia	14	● INSTRUA JES, IMPONA MALPLI	
● AKTUALAJO	15	1592 KOMENIO 1992	20
● KANTO AL SARAJEVO	15	● OMBRO - bildstrio	20
● INTERVJUO	16	● LITERATURO	21
● UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO	17	● ETULA ANGULO	22
● KONCIZE	18	● JUNULARA PAĜO	22
● FUNEBRA SCIIGO	18	● HEROLDO DE ESPERANTO	23
● PEDAGOGIA PAĜO	19	● AMUZAĴOJ	23
		● ANONCOJ	24

Komence de septembro Kroatio oficiale vizitis vicministron de la Registaro de Bosnio kaj Hercegovino, m-ro Darko Tipurić. Li estras registaran agentejon por la akceptado kaj distribuado de la helpo sendata ĉiutage el la tuta mondo.

Ni petis lin, respondi al kelkaj demandoj por nia gazeto, kiuj verŝajne estos interesaj por Esperantistoj tra la mondo.

K.E. Sinjoro Tipurić, Sarajevo - konata urbo tra la mondo jam kvin monatojn estas atakata. Do, hodiaŭ vivi en Sarajevo...

Tipurić: Sarajevo estas urbo preskaŭ dektriole pli granda ol Vukovar (red. urbo en Kroatio, detruita pasintnovembre), sed estas eĉ preskaŭ same detruita kiel ĝi. Ĉiu domo estas trafita, homoj mortadas sur la stratoj de granatoj aŭ de kaŝitaj pafistoj, sur la stratoj estas ĉiu tage sango. Gravaj institucioj, preĝejoj, moskejoj, urbodomo estas detruitaj, vendejoj kaj urba trafiko ne funkcias, same ne ekzistas ia ajn formo de la komuna socia vivo. Homoj vivas de la humana helpo kiu venadas, kaj tiel jam kvin monatojn.

Sarajevo tiel maniere vivas en septembro 1992, duan monaton sen la akvo kaj elektro. En la urbo nun vivas preskaŭ 380.000 loĝantoj, kaj ili gardas la urbon. De la urbo restis nur la spirito, kiu vivigas ĝin.

Ĉirkaŭ la urbo estas du ringoj, kaj oni ne povas forlasi ĝin. Sola elbeco estas pere de aviadiloj de la UN kiuj alportas helpon. Tia maniere la urbon forlasas ŝtataj reprezentantoj kiuj devas vojaĝi eksterlanden kaj reprezenti la ŝtaton.

Do, vivi en Sarajevo estas kiel en la oka ringo de la infero.

Sarajevo estas granda tragedio por la civilizo. La urbo estis ĉiam konata pro sia malfermejo, ĉi tie renkontiĝadis orienta kaj okcidenta civilizo. Mi kvankam Sarajevano devas diri, ke la urbo krom la spirito de siaj loĝantoj estas ruinaĵo.

K.E. Sed, bedaŭrinde, Sarajevo estas nur unu urbo en la ŝtato...

Tipurić: Jes, Sarajevo estas nur unu parto de la ŝtato: Travnik, Gradačac, Jajce, Bihać, Goražde, Foča, Zvornik, Široki Brijeg, Stolac, Čapljina estas detruitaj urboj. Same la hercegovina perlo Mostar trapasis strangajn tagojn, ĝia historia parto estas nerekonuebla.

Ĉion konstruitan dum la jarmilo, ĉar Bosnia ŝtato jaraĝas almenaŭ unu jarmilon, do ĉion tion oni deziras detrui dum kvin monatojn, simple ebenigi kun la tero.

Eĉ pli stranga afero estas murdigado, martirado. La tuta Bosnio sangas, sed ankoraŭ vivas iu spirito en la homoj, kaj ili esperas ke oni fine sukcesos ĉion tion venki.

Bosnio kaj Hercegovino ne volis ĉi militon, Bosnio kaj Hercegovino estas lando de la larĝa animo kaj la donacemaj manoj, en ĝi neniam iu sentis sin endanĝerigita.

Ĉio kio okazas, doloros Bosnion kaj Hercegovinon ankoraŭ cent jarojn.

K.E. Alproksimiĝas vintro, kiu ĉiam estis granda problemo en Via ŝtato. Tiu problemo nun estas eĉ pli granda.

Tipurić: Tuta ekonomio estas detruita, kaj se la milito finos ĉi momente, oni bezonus almenaŭ kvin jarojn humanan helpon. Vintro estas granda problemo de Bosnio kaj Hercegovino. Ne estas akvo, elektro, oni bezonas ĉion por anstataŭigi ilin, ĉion kio ebligas al la homoj travivon; grandajn kvantojn da manĝaĵo, varmaj kovriloj, plasto por anstataŭigi fenestrojn, varmajn vestaĵojn. Ni prilaboris programon por la vintra periodo, kaj ni esperas realigi ĝin kun la helpo de la Sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj por la rifuĝintoj.

Tuta ŝtato tre malfacile travivos venontan vintron. Bedaŭrinde, estos granda nombro da viktimoj, mortintoj pro la malvarmejo kaj malsato. Pro tio, Bosnio kaj Hercegovino jam en oktobro eniros la plej strangan parton de sia historio.

K.E. Ĉu por la fino de la intervjuo Vi deziras ion aldoni?

Tipurić: Mi deziras danki al la popolo de la Respubliko Kroatio, kiu multon faras por niaj rifuĝantoj kaj loĝantaro de la ŝtato.

Same mi dankas al ĉiuj tra la tuta mondo kiuj amas Bosnion kaj Hercegovinon, kiuj deziras al ĝi ĉion bonan. Mi dankas al ĉiuj kiu pensas pri Sarajevo kaj suferas kun ĝi.

La popolo de Bosnio kaj Hercegovino tion estimas.

K.E. Ni dankas al s-ro Tipurić, kiu kvankam havis tre streĉan programon, trovis tempon por doni al ni intervjuon.

Ni esperas, baldaŭ ricevi iun informon pri la vivo de Esperantistoj mem, kaj en venonta numero ni prezentos ĝin.

Intervjuis: Marija Belošević

MEJLI (1713-1781) KANTO AL SARAJEVO

Mi suspiras kiam menciatis la Sarajeva junularo; bruligis min la malĝojofajro pro la disiĝo disde Sarajevo.

Nur en paradizo troveblas ĝiaj akvo kaj aero. Mia karulo, kie en la tuta mondo eblas trovi urbon egalan al Sarajevo!

Kun la paso de la primtempo ĉie floroj ekbuntas; al paradiza parko transformiĝas la rozĝardenoj Sarajevaj.

Ĉu mirige ke mi komparas ĝin al paradizo? La sarajeva junularo estas la paradizaj junuloj kun Ridvano.


Ŝajnas al vi ke la paradizaj belulinoj haltis ĉe la bordo de Kevser, kiam en Bendbaŝa aperas la junularo Sarajeva.

Ĵetu foje rigardon al la urbo kiam la floroj ekpompas; al vi ekŝajnos ke ĉiu angulo plenas de la luma puro.

Ĝardenoj belaj, akvo bela, kaj belulinoj karaj, ĉio estas unuloke. Ne, dio mia, nenio mankas en Sarajevo.

Dio granda gardu ĝin kontraŭ ĉiuj malfeliĉoj; estu neniigita la malamiko de Sarajevo, se iam ĝi ekzistos!

El la Kroata: Lucija Borčić



Sarajeva urbodomo el la 19-a jarcento, detruita dum ĉi milito.

Okaze de la Internacia semajno de infanoj, ni intervjuis s-rinon Ursula Grapataglia, kiu kun sia edzo edukas kaj zorgas pri la infanoj en "Bona Espero" en Brazilo.

K.E. : Bonvolu mallonge prezenti Vin.


U. G. : Mi naskiĝis en Berlino kaj en la tempo de la dua mondmilito mi estis deportita en Pollando, kaj mi vidis la lastan batalon en Berlino en la jaro 1945. Tio profunde postlasis en mi la deziron fari ion por la paco, la paco sen politiko, kiel simpla civitano. Kiam mi estis 16-jara mi aŭdis pri Esperanto. Mi studis latinan, anglan, francan, germanan lingvojn en franciskana monaĥejo. Mi pensis, tio- Esperanto verdire estas bela ideo, sed verŝajne ne funkcias. Mi estis komplete kontraŭ Esperanto kaj mi iris al la kurso por koni ĉiujn malamikojn de la kulturo. Sed oni konvinkis min, pri la grandiozece de Esperanto, kaj ĝia ideo, kaj do, mi iĝis tre favora Esperantisto kaj jam estas veterano de la movado, ĉar mi 42 jarojn batalas en la vico de la Esperantistaro. Mi tuj komencis korespondi, sed ne por edziĝi, nur tiel ĉu ne? Kiam mi iam iris al internacia junulara renkontiĝo en Alpoj, en la loko kiu nomiĝas Granda Paradizo, mi renkontis mian korespondanton tie kiel organizanton de tiu tendaro, kaj estis pasia momento kaj do ni poste geedziĝis.

K.E. : Vi multe aktivis en la Movado.

U. G. Jes. En Torino mia edzo estis la ĝenerala sekretario de la itala movado, redaktoro de la revuo, kaj prezidanto de la loka klubo. Li lecionis en la popolaltlernejo 15 jarojn Esperanton, ankaŭ mi, kaj ni multe vojaĝis. Ni organizis karavanojn al la UK dum 15 jarojn. Do ni faris sufiĉe mondvestan agadon.

K.E. : Sed unu via vojaĝo ne estis ordinara.

U.G. : En la 1973 ni vojaĝis al Sudameriko kun niaj du filoj, denaskaj Esperantistoj. Ni vizitis multajn urbojn kaj ankaŭ Esperanto - bienon en la centro de Brazilo. Ni estis ricevintaj kvin jarojn antaŭe cirkuleron pri tiu laboro, kaj tio interesis nin, kaj ni volis dum du tagoj viziti tiun "Bonan Esperon". Ni iris tien je la Kristnasko 1973 kaj ĝi impresis nin tiel profunde, ke ni decidis ŝanĝi nian vivon, ni decidis vendi ĉion, lasi la civilizacion, kaj iri tien en la Alta Paradizo. Tie vivis ses brazilaj Esperantistoj, kiuj estis profunde spiritualaj homoj. Ili estis universalistoj kaj homaranoj en la vera senco de la universala homo. Ili pensis ke ne sufiĉas ke homoj nur lernu Esperanton, instruu ĝin, disvastigu ĝin, sed ke Esperantistoj devas ion fari por partopreni en la grandaj problemoj de la homaro: analfabeteco, grandaj malsanoj kaj malsato. Kaj mi vidis grandan sencion tie. Ĉar fine kiam oni estas inter 40 kaj 50 jaroj, oni sentas ia sence ŝanĝon de valoroj de la vivo. Antaŭ kvardeka jaro oni deziras havi belan aŭtomobilon, grandan domon, naĝejon, vojaĝojn, kaj kiam ĉion tion oni havas, oni deziras ion pli, kaj serĉas, serĉas. Sed tio ne estas esprimebla en la financaj valoroj, sed nur en la spiritualaj valoroj. Ni iris tien, ni forlasis nian ĝistiaman vivon. Mi estis interpretisto en la komuna merkato, kaj multon laboris dum la internaciaj kongresoj, kaj mia edzo laboris ĉe FIAT kiel ĉefo en la projekta fako. Do, ni iris tien por eduki infanojn, infanojn kiuj ne havas patrinon, ofte ne havas patrojn, infanojn kiuj bezonas ĉion por havi dignan estontecon. Evidente ne estis facile, ĉar ni ne konis la portugalan lingvon, ni havis financan sekurecon, sed ni ne havis iujn konojn pri la kresko de bananoj kaj kafo, kaj do ni lernis kun la infanoj kaj kun tiuj homoj kiuj loĝis tie. Ili intertempe tre maljuniĝis, kaj nur du ankoraŭ estas ĉe ni, kaj ili ne laboras, ili apogas nin. Ni jam estas 18 jarojn tie.



K.E. : Vi menciis, ke Vi forlasis bonan laboron en Italio, sed same Vi forlasis geamikojn, kunlaborantojn. Ilia reago estis...

U.G. : Jes, estas tre interese ke Vi tion menciis kaj komprenas. Malmultaj komprenis, estis homoj kiuj tion ne pardonis al ni, ili sentis sin trompitaj de ni, ĉar ni subite lasis multajn ostojn ia sence; E-grupon, la E-kurson, la laborejon. Sed ĉiu rajtas vivi sian vivon, kaj starigi prioritatojn pri valoroj de homaj vivaj valoroj. Ni ne diris al parencoj kaj ĉiuj aliaj niajn kialojn, kaj ili pensis ke ni tie gajnos grandan monon. Ekz. ĉefo de FIAT diris al mia edzo: ha, vi forlasas tiel bonan postenon, kie vi gajnas tiom da mono. Vi en Brazilo certe gajnos multe pli ol ĉi tie. Kaj mia edzo diris: ne estas ia ajn komparo, inter tio kiom mi gajnos kaj kiom mi gajnis ĉi tie.

K.E. : Do, kaj Vi komencis vivi alian vivon.

U.G. : Ni venis al Brazilo kiel lasta enmigrinto sur la ŝipo kun multaj kestoj. En la Esperanto - ligo Esperantistoj instruis al ni la portugalan lingvon kaj ni ekfaris sufiĉe vastan socian laboron. Ĝis nun pli ol 200 infanoj loĝis kaj lernis ĉe ni, ili daŭrigas esti Esperantanoj, havas kontaktojn kun ni, do ni estas kiel unu kultura centro. Nia lernejo estas meze de la savano, sen elektro, sen ia ajn asfaltita vojo. Ni alfabetigas ilin, ofte ni prenas el unu familio pli infanojn, ĉar oni ne povas fari diferencon inter ili. Ni alfabetigas ilin, edukas ilin por la vivo. Oni mem laboras en legomejo. En laborejo ili lernas diversajn utilajn metiojn.

K.E. : Sed baldaŭ post Via foriro, Vi vizitis Eŭropon.

U.G. : Unu jaron post nia alveno ni vizitis plurajn urbojn en Eŭropo kaj montris filmojn pri nia laboro. Multaj Esperantistoj sentis sin vokitaj helpi. Oni spontane fondis grupojn en plurajn landojn, kaj en Germanio Societon de la "Bona Espero" kaj ili decidis ĉiu monate pagi 5 markojn. Pluraj utilaj projektoj proponitaj de ni, estas financataj de tiu fonduso, ekz. konstruo de lernejo, domoj, laborejoj, ponto; aĉeto de la buso, litoj, kovriloj. Ĉe la komenco ni mem faris ĉion, financis ĉion, kaj tio sufiĉis por malmulte da infanoj.

K.E. : Vi en unu monda angulo feliĉigas infanojn, ilian infanecon. En alia parto de la mondo oni mortigas infanojn.

U.G. : Ni ne havas televidon. Mi sekvas okazaĵojn en via lando legante "Spiegel" kaj brazilan tagjurnalon. Kaj tio estas profunde ŝoka por mi. Mi travivis duan mondmiliton, mi kredis ke ĉiuj homoj kiuj travivis tiun militon neniam plu prenos armilojn, kaj mi eĉ ne povas koncepti tiun buĉadon en via lando, ĉar tio devas esti profunda radiko de malamo, tielforta ke mi ne povas imagi.

Estas tre grave ke oni eduku infanojn al la neperforto, kaj ke la paco kun digno regu sur la tero. Laŭ mi, la milito venas pro la manko de digno al iu. Mi pensas ke estas tre grave ke la respekto estu antaŭ ĉio, la respekto al la diverseco, al la kultura pluralismo, al la rajto esti diversa de la homo. Oni ne povas eĉ imagi ke civilizitaj homoj kiel eŭropanoj povas tion fari. Mi estas optimisto, mi kredas ke la estonteco ne estas ĉi tie, la estonteco estas en la tria mondo. Ĉi tie ne plu estas socia sekureco, kuraĝo, simpleco, sed regas egoismo, havi, havi, ol esti, sed mi tre bedaŭras, tio estas konstanto farita en alia flanko de la Atlantiko.

Intervjuis: Marija Belošević

ĈU NOVA SENTO EN LA MOVADO?

Ĉi jaraj vojoj de la Esperantistaro estis direktitaj al Vieno. La Kongreso estis la plej grandaj en la okcidenta parto de la Malnova kontinento, do aligis iom pli ol 3000 Esperantistoj el sepdeko da landoj de ĉiuj kontinentoj.

La ĉeftemo estis "Kiam falas muroj de miljaraj; komuna eŭropa domo". Kaj en la rezolucio oni skribas: "... konstantas, ke plu ekzistantaj muroj, ekonomiaj, religiaj, lingvaj kaj kulturaj ankoraŭ dividas la popolojn de Eŭropo, kaj ke misuzata sento de grupaparteno nur kaŭzas suferojn por milionoj da homoj. La Komitato de UEA dum sia plurhora kunsido akceptis kelkajn rezoluciojn, sed ni en ĉi gazeto, ne havas lokon por prezenti kompletajn tekstojn. La rezolucioj verŝajne troveblaj en la nova numero de "Esperanto" aŭ alia E-gazeto. Ni prezentos partojn nur de kelkaj. Alia interesa rezolucio estis direktita al la situacio de la rilatoj inter ŝtatoj kaj etnoj en Eŭropo kaj pri tragediaj sekvoj de la provoj solvi tiujn problemojn per perfortaj metodoj. En la deklaro oni "...deklaras, ke tiaj barbaraj estas konsiderindaj kiel krimoj kontraŭ homaro...", "...esprimas sian solidarecon al la viktimoj de la militaj eventoj kaj sian pretecon laŭeble helpi Esperantistojn travivintojn...". Unu rezolucio tuŝas radio - elsendojn. Bedaŭrinde, dum la kunsido oni elŝetis la nomojn de ĉiuj gravaj stacioj (svisa kaj kroata) kiujn la afero plej tuŝas. La Rezolucio subtenas agadon ĉe la radio-stacioj kiel rimedojn por la internacia komunikado, kaj invitas aŭskultantojn reagi al la E-elsendojn. La Rezolucio pri edukado ni prezentos en la venonta numero kun la komentario de la prezidanto de ILEI mem.

Dum la inaŭguro estis prezentita nova konto de UEA "Espero" kiu kolektos monon por la Esperantistoj suferantaj pro la militoj en la tuta mondo.

En UEA ĉi jaro estis elekta, kaj oni reelektis d-ron John Wells kiel prezidanton kaj novan estraron: Ulrich Lins-vicprezidanto, Jan Jackson-sekretario, Hans Bakker, Mark Fettes, Michela Lipari kaj So Gilsu kiel estraranoj.

Krom la ĉeftemado kaj rezolucio, okazis pluraj kunsidoj de la fakorganizoj (por multaj la kongresoj estas la sola ebleco organizi kunvenojn); tradicia kongresa universitato; prezento de la venontjara kongreso.

Vesperaj programoj same abundis. La Nacia vespero bonege preparita; teatraĵo prezentita de la Bulgara E-Teatro; koncertoj; kaj ne maltrafebla kabaretaĵo de f-ino Barlanston. Ĉi lasta, eĉ povus esti sola kialo por veni al la venonta kongreso!

Kaj normale, kiel ĉiam, kongresanoj de la "nia" terspaco estis en la mezo de la intereso. Do, unue, kvankam UN proklamis sankciojn, dum la inaŭguro inter aliaj, salutis la prezidanto de JEL. Simpla, klarigo estis - sankcioj ne koncernas E - movadon! (Sed, ĉu E-movado ne plu apartenas al la kulturo, pri kio oni skribas en la dokumento?) Por via informo la kongreson inter aliaj salutis reprezentantoj el Kroatio, Slovenio, Makedonio. Dua interesaĵo okazis dum la komitatokunsido, kiam oni devis pridiskuti aliĝojn de la novaj organizoj. Do, el Kroatio (unue el Kroatio venis du aliĝpetoj, ĉar funkcias du E-organizoj, sed kelkajn tagojn antaŭ la kongreso oni rezignis pri unu), kaj Slovenio. Ŝajnis al multaj ke ne devus esti problemoj, sed male diskuto daŭris eĉ laŭ iuj kalkulantoj 20% de la tuta kunsidtempo. La problemo estis jena, kvankam du organizoj de la iama Jugoslavio petis aliĝon, la komitata komisiono proponis rezolucion laŭ kiu oni akceptu ĉiujn kiuj membris pasintjare junie en JEL.

Do, laŭ tiuj kiuj vere konis situacion en la jugoslavia E-movado pasintjare, scias ke tiam la membroj estis same E-Ligo el Vojvodino (norda parto de Serbio) kaj E-Ligo el Montenegro. Sed la proponita rezolucio ne koncernas ilin!

Vera diskuto fakte estis direktita al la kono pri la sankcioj, internacia rekonio de la ŝtatoj, kaj formale senditaj aliĝpetoj. Intervenis multaj, inter aliaj la menciinda nomo S. Milojević, kiu direktis la diskutojn al alia angulo. Li parolis pri la milito en Bosnio kaj Hercegovino, sed ĉu li vere pensis tiel direkte, eble nur Dio scias! Kaj kiam oni pensis ke venis fino, kaj akcepto de nur la du petitaj laŭ la rezolucio "Tonkin" kiu estis voĉdonita - pozitive, venis paŭzo kaj ĉio ŝanĝiĝis. Do, la komitatanoj estis petataj voĉdoni por la unua prezentita nomita rezolucio "Moon" (prezidanto de la komisiono, kiu prezentis ĝin) ĉar la proponinto rezignis pri la jam voĉdonita. Venis iom da konfuzo, kaj eĉ protestoj, sed tamen oni voĉdonis. Estis pluraj manoj, sed kiom, eble la protokolanto de la komitato nombris.

La rezolucio konstatas, ke JEL ne plu ekzistas en la iama formo, kaj oni prenas ĉiujn tiamajn membrojn krom la jam menciitaj kiel aliĝintaj landaj asocioj. Do, tamen se iu rezignas, tion povas konfirmi dum la certa tempo, se ne, simple sendi statuton kaj aliajn necesajn dokumentojn. Do, tio simple signifas, ke Jugoslavio eliris, kaj Serbio eniris! Tia maniere, plej verŝajne UEA estas inter la unuaj internaciaj organizoj kiuj rekonis Serbion! Mi persone nenion havas kontraŭ Esperantistoj el Serbio, kaj ili povas esti individuaj membroj de UEA - kiel privataj personoj, sed la oficiala organizaĵo nomata Serbia E-Ligo ne dum validas sankcioj. Laŭ mi ja temas pri kulturo priskribita en la rezolucio 757 de UN.



F-ino Barlanston

Por la fino nur aldoni, ke laŭ la opinio de la certa parto de la komitatanoj la afero estis farita kontraŭ la statuto kaj la regularo.

Dum la solena malfermo al la anoj de la AKK kaj al la helpantoj kiuj ebligis okazigon de la Kongreso oni esprimis dankon donacinte rozojn, nur forgesinte KKS Nikola Rašić!

M. Belošević



Dumpaŭza solvado de la eksjugoslavia "problemo"
Wells, Moon, Tonkin

KONCIZA PREZENTO DE LA E - AGADO

E-ludejo

Dum la someraj monatoj, KEU organizis en unu zagreba porinfana biblioteko E-ludejon por la infanoj kiuj pasigis siajn feriojn en la urbo.

Oni ludis diversajn ludojn ekkonante kelkajn E-vortojn.

La E-ludejo daŭrigos sian agadon dum la lernojar, unu foje semajne.

Internacia ekspozicio

Jam atingis la sidejon de KEU cento da desegnaĵoj, kiujn oni ekspoziciis komence de oktobro en Zagrebo, okaze de la Internacia Semajno de Infanoj. La desegnaĵoj faritaj de la E-lernantoj jam venis el Finnlando, Hungario, Rumanio, Bulgario, Brazilo.

Post Zagrebo, la ekspozicion gastigos aliaj kroataj urboj.

E-kursoj en la bazlernejoj

En kelkaj zagrebaj bazlernejoj oni jam enketis gelernantojn por la ĉijara kurso de Esperanto. La kursoj komenciĝos en oktobro, kaj estos gvidataj laŭ la "Tendaraj tagoj".

Estas aparte menciinde, ke en unu bazlernejo, la ĉi jara kurso okazas jam la 20-an fojon.

E-kurso por mezlernejoj kaj studentoj

KEU oktobre komencos organizi kursojn por mezlernejoj kaj studentoj laŭ la nova metodo en Kroatio "Gerda malaperis...". La unua kurso okazos en Zagrebo. Sed jam estas invito el aliaj urboj por fari semajnfinajn kursojn.

Poemkolekto de Kroatio el Hungario

Komence de oktobro estos finpresita poemkolekto de 12 poetoj Kroatoj vivantaj en Hungario. La poemkolekto estos eldonita du lingve - originale skribita en la kroata lingvo (literatura lingvo aŭ la dialekto) kaj Esperanto. Ĉi libro estos ekspoziciita dum la granda ekspozicio de unujara eldonaĵo en Kroatio, fine de oktobro.

De la Pola Radio, E-elsendo venis al ni amaso da interesaj informoj. Ni prenos nur kelkajn koncize.

Ĉu vi scias pri la konkurso pri raportado?

Do, E-elsendo de la Pola Radio estas la dua redakcio laŭ la reagoj al la programo (la unua estas la germana, la tria angla).

Dum la unuaj ok monatoj E-redakcio ricevis 1110 reagoj. Laŭ la statistiko "gvidas" Germanio, Nederlando, Ĉeĥo-Slovakio kaj Finnlando kun pli ol cent reagoj.

Ĉiuj kiuj sendas dum septembro kaj oktobro almenaŭ tri kontribuojn estos lotumitaj por la premioj.

Temo laŭ via elekto

estas nova iniciato de ĉi aŭtuno. Oni petas la aŭskultantojn sendi proponojn de unu aŭ pli da temoj koncernantaj la polajn aferojn, kiujn oni pritraktos en la elsendoj.

Senpaga servo

Se vi deziras saluti iun aŭ gratuli al iu Kristnaskon kaj Novan Jaron pere de bondeziraj koncertoj skribu al Pola radio E-elsendo kaj petu la mendilon. E-redakcio antaŭsciigos ĉiujn salutotajn personojn pri la dato kaj horo de la salutoj.

Kaj jen la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio
00-950 VARSOVIO, Box - 46, Pollando
telefakso: +48-22-444123

* * *

LASTA NOVAĴO

49-a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO VRACA, BULGARIO

7-a ĝis 14-a de aŭgusto 1993

"Ekonomio kaj socio en ŝanĝiĝo"

Adreso: LKK, p.k. 26, BG-3000 Vraca

telefono: +359 (0) 92 24890

fakso: +359 (0) 92 24408 Esperanto

pli da informoj en la 3-a nro. de "KE"

FUNEBA SCIIGO

Forpasis fervojisto

En la unua ĉijare varmega aŭgusta semajno, en rijeka forpasis emerik Pretnar, multjara esperantisto kaj fervora aktivisto en la rondo de Rijeka en 78-a jaro. Kvankam laŭ profesio instruisto en la fervojiista fak-lernejo, li estis tre bona organizanto de financaj agadoj, kion bone spertis ne nur fervojistoj, sed ankaŭ ĉiuj aliaj vizitantoj iun arangon en Rijeka. Lia intereso multe transiris la fervojistajn agadojn, li vizitis plurajn internaciajn kongresojn ankaŭ la universalajn.

Lokaj samideanoj el Rijeka kortuŝe forakompanis lian korpan restaĵon al Ljubljana, lia naskiĝurbo, al kiu li estis reportita post jardekoj pasigitaj ekster la slovena tero.

Emilija Lapenna

Forpasis Pero

Predrag Đaković, por amikoj kaj esperantistoj Pero estas unu el la septembraj viktimoj de la milito, kiun li aktive partoprenis nur kelkajn tagojn kiel kuracisto.

Pero naskiĝis en Zagreb en la jaro 1948, kie li finis medicinan fakultaton. Dek kvin jarojn li laboris kiel kuracisto sur insulo Ij (apud Zadar). Reveninte en Zagreb antaŭ 12 jaroj, li posteniĝis en Stacio por urga helpo, kie li laboris ĝis la foriro al milito.

Li esperantiĝis en la jaro 1966 en Studenta Esperanto-Klubo kie dum siaj studentaj tagoj li estis tre aktiva ano (kursgvidanto, ano de la drama sekcio kun kiu li partoprenis plurajn kongresojn).

Reveninte al Zagreb li estis favora membro de la ES " Bude Borjan " ĉiam preta prelegi pri la fakaj medicinaj temoj.

Li forlasis edzinon kaj kvin geinfanojn ĉiuj esperantistoj, kaj amason da kolegoj kaj esperantistoj.

Pli granda, internacia kaj aĝvaria

26a KONFERENCO DE ILEI

Kun 112 partoprenantoj el 23 landoj, la 26a ILEI - konferenco en Bratislavo (Slovakio) estis la plej granda kaj internacia de la lastaj jaroj. Dank' al la situo, kolegoj el Pollando, Rumanio, Hungario kaj Bulgario povis unufoje partopreni, dum instruistoj el Aŭstralio, Argentino, Brazilo,

Israelo, Usono kaj Zairio kompletigis la internaciecon. La aĝvario estas dankeble al nova iniciato de ILEI, gimnazia semajno por 13 - 16 jaruloj paralele aranĝita / vidu venontan tekston /.

Ĉeftemo de la Konferenco estis la vivo kaj lingvo - instruaj teorioj de la pionira pedagogo Komenio, kies 400-jaran jubileon oni nun celebras. Temajn prelegojn prezentis d-rino Vera Barandovska - Frank kaj s-ro Miroslav Malovec. Gast-prelegis en la malfermo la vic-prezidanto de UEA, d-ro Ulrich Lins, laŭ la temo " Edukado kontraŭ naciismo "; tie spronis viglan kaj aktualan debaton pri ŝovinismo, naciismo, internacismo kaj paco kaj ilia rilato al E - instruado. Deko da pliaj prelegoj okazis dum la semajno kaj ankaŭ Cseh-seminario organizita de IEI.

Du novaj sekcioj estis akceptitaj: Kroatio kaj Rumanio. Aligpeto de Kubo estos poŝte traktita; rilatoj kun instruistoj estis starigitaj en la lasta jaro en Albanio, Armenio, Aŭstralio, Islando, Togolando kaj Ukrainio.

Sur la eldona kampo konkreta atingo estis la apero de la dua kajero de la porjunulara lernolibro " Tendaraj tagoj ".

Okazis parta estrarelekto, per kiu reeniris la gvidan organon d-ro Till Dahlenburg el Germanio.

Dum la UK en Vieno la Komitato de UEA akceptis regularon por la supera nivelo de la ekzamenoj de UEA/ILEI, kaj sesio por la elementa ekzameno rezultis en naŭ sukcesintoj kaj por la meza dek du.

R. Glossop/S.MacGill

* * *

Instruista kurso:

Kiel instrui komunike

Ekzistas ne nur la gramatika kaj la Cseh-metodo en la mondo. Kiu volas spertiĝi pri la nuntempe populara kaj sukcesa situaci-komunika aliro al lingvo-instruado havos la okazon en la Esperanto-Centro Poprad de la 6a ĝis la 9a de novembro 1992. ILEI okazigos tie intensan partoprenigan tri-tagan kurson por konigi la filozofion kaj teknikojn de tiu metodo.

La kotizoj estas moderaĵ konforme al la limigita pagipovo de praktikantaj instruistoj ajnlande; 48 ĝis 60 gld. po kurso, loĝigo kaj manĝoj. La kurso baziĝos sur la lernolibro " Tendaraj tagoj " kaj donos konsilojn kiel apliki ĝin kaj kiel organizi rol-ludojn.

Informoj kaj aliĝilo: ILEI, Eso ut. 7 III, H-1034 Budapeŝto.

Interesuloj el Kroatio bonvolu turni vin al la ILEI sekcio ĉe Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg burze 2, Zagreb.

Eblas komuna vojaĝo. Ĉe la menciita adreso vi povas ricevi ĉiujn pliajn informojn pri la kurso kaj ILEI ĝenerale. Same membriĝi. Do, ILEI LS atendas vin!

SUKCESA LANĈO DE NOVA PROJEKTO

Esenca parto de la 26a ILEI - konferenco estis la Gimnazio, t.s. internacia semajno por 13 - 16 jaraĝaj geknaboj. Ili loĝis, manĝis, ekskursis kaj ĉiutage konversaciis kun la konferencanoj, tamen la 18 gejunuloj (el 8 landoj!) havis apartan programon kun 30 - minutaj lecionoj pri matematiko, literaturo, muziko, geografio, pri Komenio kaj kalkulado per sorobano.

La gejunuloj povis interkonatiĝi kaj amikiĝi, pasigi vere agrablan semajnon en internacia medio. Unuflanke plilarĝiĝis ilia horizonto: brito persone aŭdis pri la rumana lerneja sistemo, kroatino pri la sveda, ĉeĥoj, poloj, hungaroj (el landoj, kie Komenio vivis kaj multe agadis) interamikiĝis kun germanoj, do en la spirito de la interna ideo vivis tie la gejunuloj kaj espereble tio influos ilin ankaŭ estonte. Ili aplikis Esperanton, lernante per ĝi diversajn temojn, serioze tamen en amuza formo.

La konferencaj gekolegoj povis sperti kvar publikajn lecionojn: po unu pri matematiko (P. Arnaudov, Bulgario), pri

muziko (ges-roj R. kaj F.G. Rossler, Germanio), pri geografio (S. MacGill, Novzelando/Hungario) kaj pri E - literaturo (E. Tvarožek, Slovakio), krome prezenton de kunagadaj ludoj (G. Tilleux, Belgio). Tiuj lecionoj stimulis pedagogian kaj metodikan diskuton, do ne nur teorie sed ankaŭ praktike estis demonstrate, kiujn trajtojn de la instruista personeco kaj kiunivelajn fakajn sciojn postulas instruado; krome kiel instigi la geknabojn dum kaj inter lecionoj je aktiva partopreno en la lernprocezo.

Laŭ la prijuĝo de la geknaboj mem la muzikaj kaj matematikaj instruhoroj plej popularis. Belajn muzikajn programojn - kun fokuso je ritmo - ili prezentis al la konferencanoj. Al la internacia vespero pluraj kontribuis per literaturaj kaj aliaj programoj, anticipe preparitaj. Ĉiu el la gejunuloj estis unuflanke talenta, kapabla, inteligenta, aliflanke afabla kaj amikiĝema persono, kompreneble ĉiu memstara, aparta individuo kaj personeco. Pluraj el ili parolas kelkajn lingvojn. Estas promesige, ke ni havas tian junularon, kian reprezentas tiuj 18 geknaboj. Ni esperas, ke al venontaj gimnaziaj semajnoj povos kaj emos reveni pluraj el ili, aldone al novaj gejunuloj, kun aĝo inter la Infana Kongreseto kaj la diversaj junularaj aranĝoj (IJK, IJS, IJF, IS, ktp.)

Kelkaj geknaboj esprimis la deziron okazigi du-semajnan gimnazion. Tio, bedaŭrinde, havas obstaklojn, sed kiel kritiko - estas tre favora. ILEI intencas eldoni la studmaterialon de la gimnazia semajno, por ke ĝi estu ne nur efemera travivaĵo por la partoprenintoj, sed ankaŭ komuna trezoro por apliki, aŭ analizi kaj plibonigi.

Ni esprimas koran dankon al la gekolegoj instruistoj en la Gimnazio kaj gratulas kaj salutas la partoprenintajn gejunulojn, kiuj ekstaris ankaŭ per konscia, memvola disciplino.

BARCSAY Zsuzsa
Gimnazia direktorino

INSTRUA JES, IMPONA MALPLI 1592 KOMENIO 1992

Instrua legaĵo. Grandformata, 38-paĝa, eldonita en Germanio fare de la Esperanto-Centro, Paderborn, 1992.

La tekston esperantigis Zsuzsa Barscay.

Tiun eĉ ne 50-paĝan kajer-formatan libron, honore al unu el la plej gravaj, mondfamaj pedagogoj kaj filozofoj, eldonis (en kvar lingvoj) Comenius College el la nederlanda urbo Hilversum kun la financa helpo de 10 instancoj, inter kiuj ankaŭ la Paderborna centro.

Tuj sin trudas komparo: Rememori sur 38 paĝoj 400-jaran datrevenon de unu el la plej konataj eŭropaj sciencistoj, necesis financa helpo de 11 instancoj kaj certe kosto de nur unu kesto da revolveroj superas kelkoble la eldon-prezon de tiu libro. Tuja konstato: Bedaŭrinde, dum la forflugintaj 400 jaroj la mondo ne suface ŝanĝiĝis.

La ĉeĥa esperantisto Adolf Stanura en "Heroldo 9/92" rimarkas: "... la kompleta ĉeĥa nomo devas esti Jan Amos Komensky, ne Amos Jan." La nom-formo Komenio estas la kvara uzita por tiu fama sciencisto, kiu naskiĝis en Moravio kaj tiun landon titolas "Kara patrino, patrujo, la Morava tero..."

Lia patro estis Marton Segeš kaj la nomo Komensky devenas de la vilaĝo Komno. La nefavora destino ekde la komenco kapricis rilate la personecon de tiu eminenta homo, kiu ne estis Ĉeĥo, ne estis Komensky, estis orfo, vivis ĉe siaj geonkloj en Ĉeĥio, ne facile. Akiris universitatan agnoskon pri "Magister nationum", ĝis fino de la vivo deĵoris en du profesioj: pastora kaj instruista. La plejan parton de la vivo estis elmigrinto el Pollando, Hungario, Svedlando, Grandbritio kaj Nederlando, en kies plej granda urbo Amsterdamo li mortis, 78-jara.

La unua ĉapitro rakontas pri la infanaĝo kaj la vivo de Jan Komensky en la



libro konstante titolita Komenio Jano Amoso. Ĉiuj personaj nomoj aperis esperantigitaj kvankam multaj tion nek ŝatas nek opinias ĝusta. Jes, vere, la kompleta listo de nomoj en origina formo troviĝas presita sur la dorsa kovrilo. La vivskribo estas konciza, informplena, simbiozo inter la faka kaj popularscienca stiloj kun nemulta literatura lako. La sekvantaj ĉapitroj pri la pedagogiaj kaj sciencaj verkoj kaj okupiĝoj de tiu fama pastoro, estas samstilaj. Iom da literatura spico pli proksimigus la legaĵon al la legantoj. Ĉiupaĝaj ilustraĵoj bone kompletigas la tekston. Certe la plejan atenton kroĉos represaĵoj de originaj libro - titoloj kaj tekstoj.

Por esperantistoj la plej leginda estos la lasta parto, kiu prezentas la libron "Via lucis", en kiu Komensky pledas por artefarita lingvo "ĝenerale uzota de la tuta homaro".

La traduka lingvo en la tiel nomata ata-verboformo kaj uzo de la arkaikiginta uj-

finajo por landonomoj, harmonias kun neverva enhava etoso.

Resuma impresio: Eble foje la verda socio trovos eblecon eldoni pli imponan libron honore al unu el la unuaj reformistoj de la pedagogia sistemo kaj proponinto pri enkonduko de internacia lingvo.

Emilija Lapenna

Esperanta versio aĉetebla ĉe:

Zsuzsa Barscay, Budapest, Bem rkp. 25

aŭ Esperanto - Centro Padenborn

Kroata Esperantista Unuiĝo planas eldoni tradukon al la kroata. Pli da informoj en la venonta numero.

BILDSTRIO


OMBRO

Aŭtoro: Ninoslav Kunc

ĈI TIU BILDSTRIO
ESTAS LA UNULA
EN...



.... KIU ONI
LUDIS
TENISON....



Laŭ la romano de la aŭtorino Marija Jurić - Zagorka, honore al la 900 - jariĝo de la urbo Zagreb, rerakontis kaj esperantigis Velimir Lukež.

dua parto
"LA SORĈISTINO DE GRIĈ"
FANTOMO ANTAŬ LA ŜTONA PORDEGO

Fermitaj feraj ŝutroj sur la fenestroj de la burĝaj dometoj, kaj la lasta bojado de vagantaj hundoj, okulfrappe konfirmis ke la urbeto jam plenkvietiĝis.

Tute proksime, meze de la nokta mallumo, sub la okcidenta muro de la Viandeja pordego eksusuris kelkaj branĉoj da hedero, tra inter kiuj aperis iu stranga ombro - sendube elirinta el la tie - ĉi lokita fera pordeto. La mistera figuro ne estis sola, lin sekvis deko da nekonatoj, ĝis kalkano kaŝitaj en malhelaj manteloj. Iliajn vizaĝojn kaŝadis firme alpremitaj kovrotukoj.

Pro ĉi - nokta brilo de la luno ili zorgeme evitadis lumigitajn padojn kaj subite, sen iu ajn postsigno, mistere perdiĝis en la noktan mallumon.

La saman nokton, aliflanke de la monteto Griĉo, laŭ la Monafina strato rezolute reeĥis rapidaj kaj decidemaj paŝoj de du urbaj gravuloj, direktiĝantaj al la malsupra urbo, kie ili celis ĝis noktometo atingi la malbonfaman fonton Manduŝevac.

Alproksimiĝantaj - ili tuj sin kaŝis apude, kie ili intencis renkonti la tutan aron da sorĉistinoj, dancantaj sian sorĉkunvenon.

- Jen sinjoro, rigardu - eĉ ne unu mi vidas ĉe la fonto, timeme sufloris la juĝisto Krajaĉić al sia kunulo.

- Kompreneble, malaŭte ekflustris la advokato Dvojkoviĉ, vi bone scias ke sorĉistinoj kunvenadas ĉi - tie akurate je noktomezo. Tiu fonto estas ilia forigebla renkontiĝ-punkto, sed kiel mi diris - nur noktomeze. Intertempe eblas, ke hodiaŭ io devigis ilin ŝanĝi la planon, kaj tiun nokton orgii en la Viandeja strato, aŭ en ia alia loko. Aŭskultu mian proponon sinjoro, sincere dirite mi rimarkas ke vi komencas timi vi eĉ tremadas! Forgesu vian ordonon laŭ kiu ni hodiaŭ forlasis la oficejon por surloke senmaskigi ilin, kaj lasu ke tion ni pli sukcese faru morgaŭ, helpe de niaj ĝendarmoj!

- Ne! Tute ne! Vi same tre bone scias ke neniu el ili obeos mian ordon, ĉar eĉ unu sola urbano ne kuraĝas alproksimiĝi tien, timante ke li fariĝu ensorĉita aŭ eble eĉ disŝirita kaj forportata en la eron. Similajn rakontojn oni aŭdas ĉiutage. Pasintan jaron en iu germana urbo estis forbruligitaj pli ol cent sorĉistinoj - sed tute vane! Multaj restis neekstermitaj! Sed se vi tion deziras, ŝajnus vere plej oportune, ke ni hodiaŭ retiriĝu, ruze trovis elirvojon la juĝisto. La du gravuloj preskaŭ senvorte forlasis la placon el kiu la malbena fonto ne ĉesis minaci ilin. Senrezulte kaj senkuraĝigitaj, ili direktiĝis al la Supra urbo, kun definitiva konkludo ke la ekstermado de tiuj diablaj virinoj ne estos simpla batalo. Kaŝitaj en malhela nokto apud la rivereto Medveščak, ili transiris la Sangan ponton, kaj preskaŭ senvorte paŝis rekte antaŭ la Ŝtona Pordego. La luno denove ekbrilis kiam niaj du konatoj, jam sufiĉe ŝarĝitaj per strangaj tiunoktaj impresoj, unuanime decidis ĉion plej rapide forgesi, kaj kviete enlitiĝi.

Sed ve!

- Silentu, ektiris la juĝisto la manikon de Dvojkoviĉ. Rigardu - ĉu vi vidas antaŭe iun blankan figuron!? Rigardu bone, ŝi estas virino - diris Krajaĉić - kaj ambaŭ subite eksaltis en la flankan vojfoŝojon.

Tute konsternitaj ili sin kaŝis malantaŭ la proksima arbusto el kie ili decidis atenteme observi la okazontan disvolviĝon de tiu nova mistera kreitaĵo. La luno brilis kvazaŭ taga suno, kaj bonŝance ebligis ilin senpene sekvi ĉiun moviĝon de tie - ĉi staranta mistera fuguro.

- Jes, certas ke tio estas virino, kaj laŭ la aspekto de sia grandvalora robo, ŝi povas aparteni nur al nobelaro. Ŝajnas nekredeble ke iu sorĉistino povas deveni el la nobelaj rondoj - flustris la juĝisto, kaj atenteme daŭrigis sekvi ĉiun ŝian paŝon. La blanka fantomo singardeme trarigardis la tutan ĉirkaŭaĵon kaj alproksimiĝinta al la muro de la defendoturo, ĝi surgrimpis iun ŝtonon, celante manatingi la kradon alfiksitajn en la fenestreton de la turo.

- Jen sinjoro, rigardu, ŝi certe bone scias ke en tiu turo estas fermitaj ĉiuj kondamnitaj sorĉistinoj - kiuj ĉi - tie antaŭ niaj turmentistoj senhezite konfesos ĉiujn siajn magiojn. Tiu turo nekontesteble antaŭsignas ilian vojon etendiĝintan ekde mia juĝejo rekte ĝis la brulŝtiparo. Jen sinjoro, li flustre aldonis, ĉu vi vidas ŝin provenirontan en la turon por liberigi ilin! Sankta Marko - ĉu tra tiu mallarĝa krado?

- Jes, jes - Via Ekscelenco - ĉiu sorĉistino tion kapablas, kaj precipe tiu - ĉi kiu tute certe ŝajnas esti ilia superulino! Sed vi tamen ne zorgu, trankviligis lin la advokato Dvojkoviĉ - rigardu pli bone, ĉu vi rimarkas ke nia mistera konatino estas ĵus foririnta. Vi nur firme enmanigu viajn sanktajn relikvojn, kaj ne timu!

La saman momenton antaŭ iliaj piedoj forkuris iu kato - malbonŝance nigra. La du gravuloj freneze ekkriis, kaj pie sin krucosignis.

- Ĉu vi vidis tiun katon - ĝi estas ŝia diablo, helpe de kiu la sorĉistino komunikigas kun, en la turo fermitaj, kondamnitinoj. Mi refoje avertas vin, vi nur firme pugnigu vian manon kaj fortike premu viajn relikvojn - ili estas la plej forta protekto kontraŭ tiu danĝero.

Dvojkoviĉ ekscitite eksaltis el la foŝaĵo, kaj ekkuris ĝis la pordego kie la blanka figuro jam malaperis. En plena mallumo, antaŭ la bildo de la Di-patrino, li kelktempe hezitis, sed ne longe - sur la planko li rimarkis brilantan aĵon kiu, levita sub la lumo de ĉi pendanta oleujo, tuj prezentis eksterordinaran skarpon, tute sendube apartenantan al iu nobela virino. Kaŝante ĝin sub la jakon, Dvojkoviĉ revenis al la juĝisto kiu daŭrigis tremadi en la foŝaĵo.

- Nekredeble sinjoro - ŝi nepercepteble malaperis, diris Dvojkoviĉ prisilentante la trovitan skarpon, nia tutnoka pelĉasado estas vane perdita. Ni iru hejmen!

La juĝisto trankviliĝis, kvankam ili estis devontaj ankoraŭ trapasi la malhelan Ŝtonan Pordegon, se ili dezirus eniri la urbon. Estis jam profunda nokto kiam ili kvankam malkuraĝigitaj eniris, kaj senvorte disiĝis. Sendube la hodiaŭa malsukceso iniciatis ilin planadi novajn agadojn.

Estimataj gelegantoj, nun vi tralegis duan parton de la literaturaĵo. Ĉar temas pri tre granda verko, ni decidis daŭre prezenti ĝin en "ZELano" kiu aperas ĉiun monaton.

Sur ĉi tiu paĝo, ni prezentos al vi ĉiam novan verkon el la kroata literaturo. Ni dankas pro la kompreno.

Redakcio

MIA UNUA GIMNAZIO

Nun mi estas en la oka klaso de la bazlernejo, sed mi jam finis gimnazion!

Temas pri la unua esperanta gimnazio, okazinta en Bratislavo, Slovakio ĉi somere, paralele kun la ILEI - konferenco.

Knabinoj kaj knaboj el Anglujo, Hungario, Germanio, Rumanio, Pollando, Svedio kaj mi el Kroatio estis tie. Ni belege pasigis tempon: ni ludis, kantis, lernis, ekskursis. Ni lernis pri muziko, matematiko, geografio kaj literaturo nur esperante.

Sed bedaŭrinde, tempo rapide pasis, kaj la gimnazia semajno finis. Dum la semajno mi multon novan eksciis.

Ni interŝanĝis adresojn kaj promesis renkontiĝi venontjare en Hispanio.

Post la gimnazio mi iris kun mia instruistino al Vieno kaj poste Zagrebo. Tio estas vere bela parto de miaj ferioj.

Martina Gazdek, Zagreb



JUNULARA PAĜO

Karaj samaĝuloj,

ĉi vortojn ni direktas unuavice al la junaj esperantistoj ĝis la 30 jaroj, sed same ĉiam bonvelas helpo kaj apogo (eĉ mona) de plenkreskuloj.

Ni donas nian unuan postsomeran vivsignon. Ni povas informi vin, ke tamen "Gerda (mal)aperos" en Zagrebo kaj ankoraŭ kelkaj urboj de Kroatio praktike dum oktobro. Do, jen finfine ni kursos (kaj la plej verŝajne) ekskursos pere kaj tra "Gerda".

Por tiu dua parto, ni atentigas vin, Zagrebon atingis malfruiĝintaj libretoj "Pasporta servo" en tre limigita nombro. Ni esperu, ke ĝis la legado de ĉi tiu paĝo ekzistas almenaŭ unu ekzemplero ĝuste por V! Tial, ne hezitu, tuj skribu al Kroata Esperantista Unuiĝo (adreson trovu en la gazeto) kaj aĉetu ĝin. Same pripensu ĉu vi povus ŝpari iom da mono por la venonta jaro. Vi ne scias kiel, ha, jen, vi aliĝu al la armeo de gastigantoj kaj vi certigos al vi mem novan eldonon de la "Pasporta servo" kaj ne forgesu senpagan! (Ĉiu gastiganto ricevas ĝin senpage).

Ni memorigas vin, por ekesti gastiganto vi devas havi:

- bonan volon
- iom da spaco por la dormosako
- aŭ eĉ pli komfortajn viveblecojn ekz. libera(j)n lito(j)n, ĉambro(j)n, domo(j)n

Vi mem devas decidi kiom da personoj dum kiom da tagoj vi povas akcepti. Same vi mem povas decidi pri la preferindaj kondiĉoj (ekz. viroj, virinoj, nefumantoj, vegetaranoj, biciklantoj). Tranoktadon vi donas senpage, kun ebla matenmanĝo kaj ĉio alia laŭ viaj eblecoj (ekz. pliaj senpagaj manĝoj, luo de la biciklo aŭ alia veturilo, ĉiĉeronado, ksm)

Aliĝilon vi povas peti ĉe KEU - Pasporta servo.

Ĉe KEU vi povas aliĝi same, se vi ne deziras pro personaj kialoj, ke via adreso troviĝu en la publika libro. Tiukaze, ni kontaktos vin, nur kiam iu direktos tranoktpeton rekte al KEU-PS.

Ni tamen, koncize, donis al vi gravan informon.

Ĝis la!

KZ& Darko Jurica

HEROLDO DE ESPERANTO

K.E. : Heroldo de Esperanto " ekzistas de pli ol 70 jaroj kaj vivas nur de abonoj. Kiu estas via sekreto?

" Heroldo " : Tiuj 70 jaroj ne estis facilaj, ĉar en ili okazis amaso da gravaj kaj malfavoraj eventoj, de la persekutado fare de la Gestapo en la 30-aj jaroj kiu devigis la fondinton Teo Jung elmigri kun la gazeto de Germanio al Nederlando - ĝis la trifoja translokiĝo (en la lastaj 30 jaroj) Suldita al niaj laborcirkonstancoj, sinsekve al Bruselo (17 jaroj), Madrido (9 j.) kaj Torino. Kiel vi diris, " Heroldo " vivas nur de abonoj: tiurilate, ĝi estas unu el la tre malmultaj gazetoj en la tuta mondo, kiu nek estas pagata de anoncado, nek ricevas subvenciojn de partio, asocio, organizaĵo, fondaĵo, k.s. Pro dignosento, ni neniam alvokas al donacoj aŭ testamentaĵoj: malgrandaj mecenataĵoj alvenas, sed spontane.

K.E. : Tamen, vi ankoraŭ ne diris vian sekreton?

" Heroldo " : Ne ekzistas sekretoj. " Heroldo " ne havas oficistojn, ne pagas salajrojn aŭ honorariojn. La tuta laboro, inkluzive tiun de la redaktorino, estas farata senpage. Por malaltigi la kostojn, ni transprenis la taskojn, kiuj antaŭe estis plenumataj ekstere. Ekzemple: dank' al teknologio, ni mem perkomputile kompostas kaj enpaĝigas la gazeton; kompreneble, ni ankaŭ provlegas ĝin, administras, korespondas, ktp. " Heroldo " ne havas propran oficejon, sed utiligas senpage la hejmon de la redaktorino; ankaŭ telefono, telefakso, k.s. estas por ĝi senkostaj. Ŝparoj kaj idealismo estas nenies sekreto. La suprajn ŝparojn ni dediĉas al tio, ke ni povas liveri sendependan gazeton al la legantaro. Tra la jaroj ni helpis al la tiamaj socialismaj landoj, akceptante de ili milon da abonoj jare en loka netraspagebla valuto. Pro la ŝanĝitaj cirkonstancoj, ni nun petas devizan pagon, sed la kolizo por tiuj landoj estas triono kaj de la landoj por la Tria mondo iom pli ol triono de la normala abontarifoj de " Heroldo ".

K.E. : Kion signifas esti sendependa?

" Heroldo " : Tio signifas distingi inter la celo kaj la rimedoj. La celo estas la disvastigo de Esperanto: la rimedo - niaj organizaĵoj, neŭtralaj kaj ne, fakaj, internaciaj, naciaj, lokaj, inkluzive de la spontanaj iniciativoj. Se io okazas favore al Esperanto, plej gravas la atingo mem; kompreneble, ankaŭ la persono, kiu atingis ĝin, meritas gratulon, sed ni ĉefe emfazas la rezulton de la ago, pli ol la aganton. Sendependeco signifas ankaŭ liberecon kritiki la organizitan movadon, kiam necese. Tamen, kritiko devas eviti fariĝi principa opozicio kontraŭ ĉio: kritiko devas konsideri la limojn de la disponeblaj fortoj, en la komuna batalo, devas nur indiki eviteblajn fuŝojn kaj esti pozitiva, nome proponi alternativajn vojojn en spirito de realeco. En la pasinto niaj kritikoj iom post iom estis transprenitaj de la tuta organizita movado. Same okazos, ni esperas, estonte.

K.E. : Aperas multaj periodaĵoj en Esperanto. Ĉu " Heroldo " havas propran specifecon rilate al ili?

" Heroldo " : La unua specifeco estas la ofteco. Dank' al tio, ke ĝi aperas 16-foje jare (inkl. de du duoblaj numeroj), ĝi estas la plej ofta gazeto en la internacia lingvo, almenaŭ inter tiuj kun granda tradicio. La dua karakterizo estas la riĉeco de ĝia informado. La historio de Esperanto skribiĝas en la kolumnoj de " Heroldo " en kiuj ĉiuj eventoj signifaj por Esperanto tuj trovas lokon. La tria avantaĝo estas la formato de la gazeto, taggazeto, unika en la Esperanto - mondo, kiu permesas laŭplaĉe disdividi la spacon en ses kolumnoj kaj ellabori varian grafikan aspekton. Al ĉio supra aldoniĝas la jam aludita sendependeco. Pro tiuj kaj aliaj specifejoj, " Heroldo " restas la plej populara internacia Esperanto - gazeto, kiun oni abonas, ne, ĉar ĝi estas ligita al iu membreco, sed ĉar oni libere ŝatas ĝin.

K.E. : Kiel vi vidas la estonton de Esperanto? Ĉu ĝi baldaŭ venkos?

" Heroldo " : La enkonduko de neŭtrala lingvo estos unu el la plej grandaj eventoj de la homaro, komparebla al la invento de la rado aŭ de la vapor - maŝino. La maturiĝo de tiaj inventoj ĉiam postulis longan tempon, en kiu ludis du faktoroj: la homo kaj la historio. La esperantistoj provizas la homan strebadon, kiu kreas la kondiĉojn por la realiĝo de la lingva venko. Aliflanke, la socio ĉirkaŭ ni devas akcepti nian strebadon, kiam la tempoj estos pretaj. Kiam tio okazos? Neniu povas antaŭvidi la eventojn. Ĉio povas okazi iam ajn. Fakte, nur antaŭ kelkaj jaroj neniu en la mondo imagis la subitan finon de " komunismo ", la falon de la muro en Berlino kaj la splitiĝon de unuecaj ŝtatoj.

En tiu perspektivo, iun tagon ni vekiĝos kaj konstantos, ke la homaro ekkonsentas kun ni, ke subite kreiĝis politikaj kondiĉoj favoraj al Esperanto. Al tio ni ĉiuj strebas.

Al la demandoj respondis s-ino Ada Fighiera Sikorska, redaktorino de " Heroldo de Esperanto ".

AMUZAĴOJ

Jen nova konkurso.

Vi bone rigardu foton, ĉar eble tio helpos solvi la taskon. Do, sur la foto estas, Stefan Maul, Istvan Ertl kaj Jacques Le Puil.

Ili ja estas konataj al la E-tutmonda publiko, ĉar unu inter ili estas kanzonisto, dua perspektiva verkisto kaj tradukisto, kaj la tria ĵurnalisto. Sed, ili havas almenaŭ unu komunan okupon same konatan tra la mondo. Du momente eĉ nun profesias ĝin. Do, se vi regule legas E-gazetojn vi tuj scios pri kio temas. Atentu, ĉi tie ne temas pri la okupo pri okulvitroj aŭ lipharoj!

Do, tio estas:

- a) aktorado
- b) bahaismo
- c) ĵurnalismo

Pri la solvota fako, ni skribos iom pli en la venonta numero de " Kroat Esperantisto ".

Espereble, ke ne estos ia konfuzo, viaj respondoj estos atendataj ĝis la 1-a de novembro ĉe la adreso de Kroat Esperantista Unuigo, Trg burze 2, 41000 Zagreb. Ne forgesu, ni ne donas nesolveblajn taskojn!

